



ELDONO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO (REU)
№ 109, decembro 2019



Saluto de UEA okaze de la 160-a datreveno de L. L. Zamenhof

Ludoviko Lazaro Zamenhof naskiĝis antaŭ 160 jaroj. Li iniciatis la internacian lingvon Esperanto ne ĉar li interesiĝis pri lingvoj, sed ĉar li interesiĝis pri paco. Kaj paco povas ekzisti kaj daŭri nur se ĝi baziĝas sur justeco kaj egaleco inter homoj, hom-grupoj, kaj popoloj.

Surbaze de ĉi tiuj valoroj la internacia lingvo Esperanto travivis unu el la plej sangaj jarcentoj de la homa historio, la 20-an, kaj ankoraŭ luktas por ĝeneraligi tiujn valorojn.

Fakte la mondo en la lastaj 160 jaroj kerne ne ŝanĝiĝis. Maltoleremo kaj perforto, deziro regi aliajn popolojn kaj perfido al sia grupo por ricevi avantaĝojn de la regantoj estas tre nuntempaj problemoj. Tio bedaŭrinde ofte prenas la formon de milito kun amasa mortigado de homoj aŭ de trudataj ekonomiaj limigoj, alivorte de trudata ekonomia malprogreso de la trafitaj landoj.

Religioj, kies kunlaboron Zamenhof alvokis dum la tuta vivo, nun estas uzataj kiel ilo por dividi kaj militigi inter si homojn.

Ĉu ni devas akcepti ĉi tiun situacion? Ĉu ni devas pensi, ke per la inteligentaj telefonoj komenciĝis nova epoko, nova civilizo, nova mondo?

Ne, ni ne devas kaj ne povas, kaj ni devas serĉi aliancinojn por vere plibonigi la mondon en la kampoj de paco, ekonomio, kulturo kaj homa feliĉo.

Se ni rigardas ĉirkaŭ ni nur la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj emus fari ion tian, ekzemple per siaj 17 celoj pri daŭripova evoluigo. Tiu organizaĵo, kiu ĉi-jare festas sian 75-an jariĝon, neniam atingos tiujn celojn, se ĝi restas kaptita de registaroj, kiuj

vorte laŭdas tiujn celojn kaj fakte melhelpas la atingon de ili. Estos necese apogiĝi sur la kelkaj progresemaj registaroj en la mondo kaj sur la homoj, kiuj deziras pacon, progreson kaj feliĉon.

Estas tempo por UN aŭskulti la homojn kaj fari siaj la idealojn de L. L. Zamenhof. Ili estas pli aktuale gravaj ol iam ajn antaŭe. Ne hazarde UEA, la monda organizaĵo de la parolantoj de Esperanto dediĉas al tiu temo sian mondan kongreson en Montrealo en 2020: “UN 75-jara: Dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝiĝanta mondo.”

Subtenu la provojn plibonigi la mondon de la Esperanto-movado kaj de UN.

Renato Corsetti
membro de la Komitato de UEA

Protokolo №7 de la Estrara decido

Dato: Moskvo, 08.12.2019

Voĉdonado: reta

Voĉdonis:

A. Lebedev, S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Mitin.

Tagordo / temo:

Pri la «Regularo pri Esperantisto de la jaro laŭ la versio de REU».

Decido:

Akcepti la proponitan projekton de la «Regularo pri Esperantisto de la jaro laŭ la versio de REU».

Rezultoj de la voĉdonado:

por: 5; kontraŭ: 0; sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: A. Lebedev.

Vicprezidantoj de REU: S. Smetanina, N. Gudskov.

Regularo pri Esperantisto de la jaro laŭ la versio de REU

1. La proklamo de la Esperantisto de la jaro (laŭ la versio de Rusia Esperantista Unio) celas:
 - honori personon, kiu faris la plej elstaran kontribuon por la rusia Esperanto-movado ene de unu jaro;
 - publike aprobi agadon kaj meritojn de tiu ĉi persono;
 - instigi aliajn esperantistojn al plia aktivado per atentigo de ili pri la brila ekzemplo de la honorata persono.
2. «La jaro» signifas kalendaran jaron, kiu komenciĝas la 1-an de januaro kaj finiĝas la 31-an de decembro.
3. La Esperantiston de la jaro (laŭ la versio de REU) proklamas la Estraro de REU en decembro aŭ en januaro, konsiderante la rezultojn de la finiĝanta aŭ ĵus finiĝinta jaro.
4. Kandidatojn nomumas membroj de la Estraro surbaze de siaj impresoj pri iliaj atingoj aŭ/kaj atentante opiniojn de la rusia esperantistaro. Proponante kandidaton, dezirindas koncize formuli liajn/ŝiajn meritojn, speciale por la rusia Esperanto-movado, speciale dum la koncerna jaro.
5. Kandidatoj povas esti ajnaj esperantistoj sendepende de loĝloko, civitaneco, nacieco, aĝo, lingvonivelo, agantaj sur teritorio de Rusia Federacio aŭ por progresigo de Rusia Esperanto-movado. Kutime kandidatoj estas apartaj personoj. Esceptokaze povas esti konsiderata kiel kandidato ankaŭ grupo el ne pli ol tri personoj. Funkciantaj estraranoj de REU ne povas esti kandidatoj.
6. La Esperantisto de la jaro (laŭ la versio de REU) estas elektata de la estraranoj el la nomumitaj kandidatoj per relativa plimulto de la voĉoj. Se rezulte de la nomumado estas nur unu kandidato, la estraranoj voĉdonas pri tiu kandidato.
7. La Esperantisto de la jaro (laŭ la versio de REU) ricevas honorfolion kaj valoran premion en formo, elektita laŭ interkonsento de la premiato kaj la Estraro.
8. La Esperantisto de la jaro (laŭ la versio de REU) povas esti ne proklamita, se entute neniu persono estos kandidatigita de la membroj de la Estraro.

Protokolo №8 de la Estrara decido

Dato: Moskvo, 15.12.2019

Voĉdonado: reta

Voĉdonis:

A. Lebedev, S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Mitin.

Tagordo / temo:

Pri Esperantisto de la jaro 2019 laŭ la versio de REU.

Decidoj:

Proklami sinjoron Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin) Esperantisto de la jaro 2019 laŭ la versio de REU pro la sukcesa organizo de Tiĥvinaj Esperanto-Metiejoj apud Tiĥvin la 15-an – 21-an de julio 2019 kaj pro la elstara multjara verkista, tradukista kaj muzika agado.

Rezultoj de la voĉdonado:

por: 5; kontraŭ: 0; sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: A. Lebedev.

Vicprezidantoj de REU: S. Smetanina, N. Gudskov.



Protokolo №9 de la Estrara decido

Dato: Moskvo, 21.12.2019.

Voĉdonado: reta.

Voĉdonis: A. Lebedev, S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Mitin.

Tagordo / temo:

Pri la «Regularo pri membreco kaj kotizoj en REU» por la jaro 2020.

Estis propono pri ĝenerala akcepto de la kuranta «Regularo pri membreco kaj kotizoj en REU» por la sekva 2020-a jaro kaj proponoj pri du amendoj;

Voĉdonoj:

1) Daŭrigi funkciadon de la kuranta «Regularo pri membreco kaj kotizoj en REU» por la jaro 2020 (eventuale kun la amendoj, proponataj de la sekvaj du punktoj — se tiuj estos akceptitaj).
por: 5; kontraŭ: 0; sin detenis: 0. *Rezulto: akceptite.*

2) Ŝanĝi la REJM-aĝon al «malpli ol 36 jaroj», do formuli la punkton I.9 de la Regularo jene: «Ĉiuj kandidatoj kaj membroj de REU kun la aĝo malpli ol 36 jaroj aŭtomate iĝas membroj de la junulara sekcio REJM (Rusia Esperantista Junulara Movado) kaj ricevas voĉdonrajtojn en REJM-voĉdonoj.»

por: 2; kontraŭ: 3; sin detenis: 0.

Rezulto: ne akceptite.

3) Fine de la punkto I.11 aldoni la frazon «Aliĝanto konsentas, ke lia/ŝia nomo, familinomo kaj regiono aperos en la publika membrolisto de REU».

por: 3; kontraŭ: 0; sin detenis: 2.

Rezulto: akceptite.

Decido

(surbaze de la rezultoj de la voĉdonoj):

La kurantan «Regularo pri membreco kaj kotizoj en REU» akcepti por la jaro 2020 kun unu amendo: fine de la punkto I.11 aldoni la frazon «Aliĝanto konsentas, ke lia/ŝia nomo, familinomo kaj regiono aperos en la publika membrolisto de REU».

Prezidanto de REU: A. Lebedev.

Vicprezidantoj de REU: S. Smetanina, N. Gudskov.



Raporto pri la fonduso de REU «Subteno de laboro pri la vortaro de B. Kondratjev» 22.07.2019–15.12.2019

Dum la periodo 22.07.2019–15.12.2019 en la fonduson de REU «Subteno de laboro pri la vortaro de B. Kondratjev» venis 5060 ₺.

Privataj donacoj (unu):

- de Boris Zozula (Rostov-na-Donu)

Sume: 1000 ₺.

Donacoj de organizaĵoj (unu):

- de Rusia Esperantista Unio

Sume: 4060 ₺.

Ekstera informado

La lingva festivalo en Vladikavkaz

Lunde la 25an de novembro en Vladikavkaz, ĉefurbo de Norda Osetio, okazis la unua lingva festivalo. Ĝin ebligis kunlaboro inter REU kaj la fakultato pri oseta filologio de la Nord-Osetia Ŝtata Universitato.

La festivalo konsistis el tri 40-minutaj blokoj po tri samtempaj eventoj. Estis prezentitaj ok lingvoj kaj unu lingva grupo (iranaj lingvoj). El naŭ eventoj de la festivalo esperantistoj prezentis kvin: la loka loĝanto poligloto Alan Bigulov rakontis pri la indonezia, veninta el Sankt-Peterburgo Den Patin — pri la hungara kaj la japana, denaske loka peterburga loĝanto Vjaĉeslav Ivanov rakontis pri la turka kaj Esperanto.



Loka specifajo krom la okazigo lunde post studado, estis ankaŭ la dulingva festivala libreto (en la rusa kaj la oseta lingvoj), kiu per si mem elvokis grandan intereson inter la partoprenantoj. Publika ĉefe konsistis el studentoj de la universitato (filologoj kaj historiistoj).


La festivalo estis riĉe prezentita en la lokaj amaskomunikiloj: la novaĵservo de la universitato kaj ambaŭ lokaj televidaj kanaloj.

La universitata estraro konsideras grandigon de la festivalo en la sekva jaro.



V. (Sl.) Ivanov

Esperanto dum la XIV Moskva internacia lingva festivalo, dediĉita al la 160a datreveno de Ludoviko Zamenhof



Jes, ĝi okazis — la plej granda evento en Moskvo por ekstera publiko, firme ligita kun Esperanto, la plej grava ĉiujara agado de MEA MASI (Moskva Esperanto-Asocio MASI). La 14a Moskva lingva festivalo la unuan fojon en la riĉa historio de ruslandaj lingvaj festivaloj havis dediĉon — al la 160a datreveno de Ludoviko Zamenhof. Dum la Solena Malfermo, antaŭ plenplena salonego de la Fakultato de neekzaktaĵaj sciencoj de la Supera Lernejo pri Ekonomiko (Факультет гуманитарных наук Национального исследовательского университета «Высшая школа экономики»), la direktoro de la festivalo emfazis, ke por Zamenhof lia lingvo estis nur ilo por atingi pacan ekzistadon de la homaro: la neŭtrala lingvo, apartenanta al neniu kaj apartenanta al ĉiuj, estas destinita por ruini barojn de nekomprenejo inter popoloj. Dum la malferma parolado en la malantaŭa muro de la scenejo estis projekciita afiŝo, dediĉita al la 160-a datreveno de Zamenhof. Kun laŭdinda rapideco per klopodoj de Renato Corsetti nome de UEA, ĝi estis farita de Penelope Vos responde al nia mendo.

Multaj legantoj bone konas niajn festivalojn. Tamen, prezentante la ĝeneralan statistikon, ni memorigu la ĝeneralan strukturon de la evento kaj ties Esperantan enhavon.

La festivalo daŭris dum 10 horoj la 1an de decembro 2019, tra tuta dimanĉa tago. Ĝi enhavis pli ol horan Malfermon kun Parado de prezentantoj (la ses Esperantaj programeroj estis anoncitaj la unuaj), 7 lecionstriojn po 40 minutoj kaj Solenan Fermon. 120 prelegantoj okazigis 185 programerojn. Dum 5 horoj laboris kun speciala lingva programo Infana Ĉambro, kie gepatroj povis lasi siajn etajn idojn. En la vasta koridorspaco tea majstro regaladis ĉiujn dezirantojn per ĉinaj teoj plej diversspecaj. Por ĉiuj prelegantoj kaj organizantoj tutan tagon funkciis senpaga Teejo — kun teo kaj kafo, buterpanoj, bakajoj, fruktoj kaj legomoj. Dum la Fermo



okazis internacia koncerto el 10 profesinivelaj artaj prezentaĵoj, danka parolado de la direktoro kaj enmanigo de diplomoj al ĉiuj kontribuantoj. Post la Fermo okazis festeno por prelegantoj kaj organizantoj. Ĉion tion prizorgis organiza teamo el 10 homoj, inkluzivanta nur unusolan reprezentanton de la universitata administraro — la vicdekanon de la fakultato Vladimir Fajer. Dum la tuta festivaltago laboris grupo el 6 komputilistoj kaj deko de gejunuloj-helpantoj. Senescepte ĉiuj homoj antaŭ kaj dum la festivalo laboris senpage. La eniro estis libera. Entute la evento ensorbis inter 800 kaj 1000 homojn.

El 10 membroj de la Organiza teamo estis kvar neesperantistoj. Aliaj estis MASianoj: Irina Gonĉarova (direktoro), Oleg Ĉajka (kunordiganto de prelegantoj), Aleksandr Basov (teknikistestro), Natalja Laziĉ (reklamado), Aleksandr Lebedev (paĝaro), Aleksej Panov (filmado).

Dum la mem festivalo teknike helpis Marat Sadikov, Maksim Silantjev,

Dmitrij Abramov,
Julia Ŝkarbanj,
Tatjana Glaznica,
Ludmila Vasiljeva.

Grandegan dankon

al ĉiuj! Kompreneble, nia festivalo simple ne povus okazi sen teamanoj-neesperantistoj: la vicdecano de la fakultato Vladimir Fajer, loka ĉeforganizanto



Anton Somin, lingva eksperto Igor Mokin kaj ĉionpova Anna Silantjeva. Grandegan dankon al ĉiuj!

La tuta Esperanta programo okazis en unu klasĉambro, kiu nomiĝis “Esperanta Teritorio” kaj estis konvene ornamita per belaj esperantaĵoj. Ĝuste ĉi tie pasis sinsekve sep Esperanto-programeroj: tri prezentoj de la lingvo Esperanto fare de tri diversaj personoj



du el kiuj estas ankoraŭ lernejanaj: jam sperta festivalano 15-jara Petro Fedosov kaj pli nova esperantisto la 16-jara Roman Ralko, kiu, tamen, prezentis Esperanton jam 6-an fojon. La tria prezentanto Oleg Ĉajka, Esperanto-poeto kaj aktivulo, iam lernis Esperanton, estinte eĉ pli juna ol nunaj junuloj, sed estis tio antaŭ ĉ. 30 jaroj. La akademiano Nikolao Gudskov en la sama salono okazigis la prelegon “Kiel kaj kial vivas Esperanto?” Alia prelego de la sama aŭtoro — “Poezio, aperinta pli frue, ol la lingvo, aŭ Kiel Zamenhof kreis Esperanton kaj kio el tio rezultis”, pasis en la spaco de “Belarta Vorto”. Ĉiu preleganto pri Esperanto ricevis siajn 15-25 aŭskultantojn, el tiuj estis homoj aĝaj ĉefe inter 15 ĝis 45 jaroj. Dum la Esperanta Gastejo okazis preparolado inter ĉiuj venintoj pri Zamenhofa ideologio kaj pri motivoj lerni Esperanton. En la lasta laborhorro de la festivalo sukcesis nia eksperimento ludi “Homluojn” en Esperanto kun esperantistoj, komencantoj kaj neesperantistoj. Tra tuta festivalo en la koridoro bolis vivo ĉe la fotoekspozicio “Mia Vorto”, prizorgata de volontuloj, ricevintaj instrukciojn de la organizantoj. Dum la Solena Fermo ĉiuj gastoj kaj prelegantoj de la festivalo estis invititaj por la senpaga tritaga Esperanto-kurso, kiu pasis en la sekva semajnfino post la festivalo kun partopreno de pli ol 10 kursanoj. Pri Esperantaj eroj kaj pri la postfestivala kurso rakontis ankaŭ aparta artikoleto en la papera programo, presita en la kvanto 500 ekzempleroj kaj, verdire kaj bedaŭrinde, elĉerpita jam antaŭ la Malfermo...

Kion diri pri impresoj kaj emocioj? Prefere ne komenci — ĉar ne eblos fini... Dankemo, admiro pri talentoj kaj kleroj, amo, amikeco, bonkoreco, sento, ke vi ĉeestas familian hejman feston de karaj samideanoj — konataj kaj nekonataj, neeblo disigi... Sed ŝajne, por la interna ideo de Moskva lingva festivalo — sentrude popularigi

Esperanton — plej valoras opinioj de neesperantistoj, pli kaj pli kaptataj de Esperanta etoso. Jen unu — de tute ne konata al ni homo, kiu racie faras siajn notojn, skrupule kaj multvorte fiksante travivaĵojn dum la festivala tago.

El impresoj de M. S. Jastrebov-Pestrickij, doktoro pri filologiaj sciencoj, ĉefspecialisto de Ŝtata arkivo de RF, triafoja partoprenanto de la festivalo. Notoj pri la prezento de la malnovslava lingvo: “Estis rakontite, certe (kaj tre interese!), pri kaj pri tio, ke la malnovslava estas simila al la artefarita lingvo Esperanto — ili estas same superdialektaj (mi unuan fojon renkontas tiun analogion! Sed ja tiuj festivaloj pasas sub egido de esperantistoj...)” Notoj pri paŭzoj inter prelegoj: “La 15-an de decembro estos la 160-jariĝo de Ludoviko Zamenhof, kreinto de Esperanto. Mi fotiĝis ĉe la flago de esperantistoj kun la plakato “Lingvisto” en la manoj. Tio estis ago «Mia vorto».”



Pri multaj aliaj impresoj kaj seriozaj analizoj de la prezentaĵoj ĉiuj povas konatiĝi en la festivala paĝaro www.lingvafestivalo.info kaj en la grupo de la festivalo en “VKontakte” <https://vk.com/mlfest>. Sed certe oni ne legos tion, kion aŭdis la organizantoj de la vicdekano de la fakultato pri humanitaraj sciencoj Vladimir Fajer dum la resuma postfestivala kunveno. Li diris: “Antaŭ la lingvaj festivaloj mi havis ne tre bonan opinion pri Esperanto, sed nun, kiam mi konatiĝis kun esperantistoj, mia opinio draste ŝanĝiĝis al pozitiva direkto”. Nu jen — ankaŭ pro tio ni laboras, homoj. Dankegon al ĉiuj!

Irina Gonĉarova

direktoro de MLF, kunordiganto de MEA MASI

<https://vk.com/mlfest>

Kial fiaskis tutrusia kampanjo pri ekstera informado okaze de la 160-a datreveno de Ludoviko Zamenhof

Ĉu vi sciis pri tiu kampanjo? Ne? Mi rakontu. Ĉi-jare estas speciala Zamenhof-Tago: nia Majstro naskiĝis precize 160 jarojn antaŭ ĝi, la 15an de decembro 1859. Kaj tio estas unika informmotivo por popularigo de Esperanto. Kompreneble, pri tiu fakto REU kaj regionestroj devus memori al rusia esperantistaro komence de la jaro, doninte belan elanon por ekstera informado. Bedaŭrinde, oni konsciiĝis nur monaton antaŭ la evento — sed nia landa aktivularo ankoraŭ ne kutimas reagi al tutlandaj alvokoj ĝenerale kaj des pli reagi rapide.

Kial la dua ago pri ekstera informado estis tiel malforta — se kompari la rezultojn kun tiuj de la tre sukcesa tutlanda projekto “Unu leciono pri Esperanto por lernantoj”? Eble pro tio, ke ne ekzistas en la lando tradicioj uzi Zamenhof-Tagon por propagando de Esperanto? Ĉiuj ja opinias tiun feston kvazaŭ familia, oni festas por si mem. Dankon, ke almenaŭ tiel.

Dua kialo: ial mem amaskomunikiloj preterlasis la jubileon de Zamenhof — kaj ne invitadis esperantistojn por intervjuoj. Denove nia kulpo: ni, esperantistoj, mem devus atentigi ilin. Laŭ niaj scioj tion faris en la tuta lando nur unusola persono — nia popularigisto-avangardulo Eŭgeno Bojĉin (Fora Oriento).

Tria kialo: ne sufiĉaj penoj de REU-respondeculo, kiu dediĉis al la kampanjo nur etan reston de sia agadtempo. Sendube, ekzistas amaso da aliaj kialoj — eble, vi sufloros. Mi alvokas nun ĉiujn, kiuj legas tiujn ĉi liniojn, respondi: kio estis via persona kialo kaj kialo de proksima por via Esperanta kolektivo, ke la jubileo de Zamenhof restis ne prilumita en viaj lokaj amaskomunikiloj, sur malfermitaj podioj, en klerigejoj kaj interreto? Foje tre gravas pripensi tiujn aferojn. Se vi agis, sed ni pri via agado ne scias, ni petas pardonon pri niaj atakoj — sed kie estas viaj raportoj? Bonvolu informi nin! Mi esperas, ke ni, vere, scias ne ĉiujn faktojn de ekstera agado, dediĉita al la Zamenhof-jubileo. La grupo “Informu!” <https://vk.com/informado> sukcesis kolekti nur la jenajn.

1.12.2019, Centro, u. Moskvo, MEA MASI

La 14a Moskva Lingva Festivalo, dediĉita al la 160a datreveno de Ludoviko Zamenhof (vidu apartan artikolon)

06.12.2019, Sudo, u. Jalto

La 9a festivalo de rusiaj popoloj, kie inter 20 lingvoj estis prezentita ankaŭ Esperanto. Esperantistoj staras centre en la parada foto, estus bone, se ne pro virina ĉarmeco, sed pro iu rolo en la festivala organizado. Sed tio estas nur supozoj. Ni kredu ankaŭ, ke estis mencio pri la Zamenhof-jubileo en ilia rakonto pri Esperanto: <https://www.3654.ru/news/2586606/na-ih-festivale-azykov-narodov-rossii-v-alte-predstavili-bolee-20-unikalnyh-azykov-i-obradov>

09.12.2019

Blogaĵo pri popularigo de la scienco “*Это работает. Наука и образование*”

<https://vk.com/@etorabotaet-zachem-izuchat-esperanto>

Positiva artikolo pri Esperanto “Зачем изучать эсперанто?” kun ligiloj al *lernu.net* kaj *edukado.net* kaj fina konkludo: “Sukceson en la lernado! Esperanto estas pli proksima kaj pli simpla, ol ĝi ŝajnas.” 10 136 trarigardoj, 586 mencioj.

Jes — iu laboras por ni pli efike, ol ni mem. Kiujn kromajn blogaĵojn, aperintajn okaze de Zamenhof-tago, vi renkontis en interreto? Bonvolu diskonigi la ligilojn!

09 kaj 14.12.2019, Volgio, u. Samara

САМАРСКИЙ ГОСУДАРСТВЕННЫЙ ИНСТИТУТ КУЛЬТУРЫ
SAMARA STATE INSTITUTE OF CULTURE

МЕЖДУНАРОДНАЯ ШКОЛА
ВЫСШИХ КУЛЬТУРОЛОГИЧЕСКИХ ИССЛЕДОВАНИЙ
INTERNATIONAL SCHOOL FOR ADVANCED RESEARCH
IN CULTURAL STUDIES

КАФЕДРА ТЕОРИИ И ИСТОРИИ КУЛЬТУРЫ
DEPARTMENT OF THEORY AND HISTORY OF CULTURE

ЧЕТВЕРТЫЙ САМАРСКИЙ
ФЕСТИВАЛЬ ЯЗЫКОВ:
КУЛЬТУРА И ЯЗЫК

6-18 декабря 2019, СГИК, Самара

4-th Samara Festival of Languages
6-18 December 2019
Samara State Institute of Culture, Samara

La 4a Samara festivalo de lingvoj: kulturo kaj lingvoj pasis la 6-18an de decembro en Samara ŝtata instituto de kulturo. Ĝi estis iniciita de Internacia lernejo de superaj kulturologiaj esploroj kaj katedro pri teorio kaj historio de kulturo; gvidanto de la projekto — esperantisto, doktoro de kulturologio, katedrestro Vladimir Ivanoviĉ Ionesov. La programon de la du Esperanto-tagoj preparis kaj kungvidis lokaj aktivuloj.

09.12, leĝejo de Samara ŝtata instituto pri kulturo. Tago de la internacia lingvo Esperanto. Gvidantoj: Jelena Kuznecova — kunordiganto de Volgia regiono de Rusia Esperanto-Unio kaj Jelena Poljanskaja – aŭtoro de la projekto “Historio de Esperanto en Samaro”.

Programo

15:00 – 15:30 Kulturo kun la nomo “Esperanto”: samara kunteksto.

15:30 – 16:00 Esperanto en la spaco de muzika kulturo: kantoj kun gitarakompano

16:00 – 17:00 Trejn-kurso de la internacia lingvo Esperanto.

Ĉeestis 20 studentoj kaj laborantoj de la biblioteko.

14.12, Samara publika biblioteko.



Tago de Ludoviko Zamenhof. Gvidantoj: la samaj.

Programo:

11:30 – 13:30 Lingvo kiel rimedo proksimigi kulturojn kaj popolojn: honore al la 160a datreveno de Ludoviko Zamenhof, iniciinto de Esperanto kaj adepto de internacia integriĝo. Ĉeestis ĉ. 10 homoj.

9-14.12.2019, Volgio, u. Orenburgo

Informas *Tatjana Kaminina*

Ĉi semajne mi rakontis al miaj studentoj, studentoj de la Orenburga filio de Rusia universitato de nafto kaj gaso, pri Esperanto kaj ĝia kreinto Ludoviko Zamenhof. La 15-an de decembro ĉiuj esperantistoj de la mondo festas la 160-an naskiĝdatrevenon de la Majstro. Mi provis rakonti en diversaj grupoj, kiel kaj kial estas kreita la lingvo, montris lernolibrojn, vortarojn, fotojn, videojn, paĝarojn en Interreto. Mi parolis kun miaj studentoj en Esperanto, montrinte la logikon de la lingvo.



VK-grupo "Esperanto en Volgograd"

Por la kunveno en la urban bibliotekon venis deko da aŭskultantoj, al kiuj Dmitriĵ Ĵuravlĵov (Dimanĉo) rakontis pri Homaranismo — la religi-filozofia instruo de Zamenhof, kaj Valentina Spicina parolis pri Esperanto kiel la plej sukcesa en la mondo planlingvo.

15.12.2019, Nord-Okcidento, u. Sankt-Peterburgo

Informas *Vjaĉeslav Ivanov*

La unua oficiala kunveno de la parola klubo Duolingo en Sankt-Peterburgo (por lernantoj de Esperanto) okazis ekde la 13:00 en tempo-kafejo apud metrostacio "Ĉkalovskaja". Venis du personoj, kiuj la unuan fojon parolis kun vivaj homoj (unu el ili antaŭe parolis skajpe, la alia neniam iel ajn). Ni bone pasigis la tempon, parte lernis/praktikis, parte kunludis (ankaŭ en Esperanto). Tiuj novaj homoj poste venis al la klubo „Kariljono“ por festi Z-tagon. La kunveno respondis al la tutmonda iniciato de *Duolingo* por inviti lernantojn per la aplikaĵo al reala uzo en parolado. Plej ofte okazas anglaj eventoj certe, sed kelkloke jam estis la Esperantaj. Tiu ĉi estis la unua en Peterburgo (eble ankaŭ en Rusio). Duolingo helpas varbi kaj promesas iom pli aktive fari tion estontece.

Anonci sian lokan *Duolingo*-eventon por lernantoj de Esperanto oni povas ĉe events.duolingo.com

Duolingo helpas reklami ĝin.

15.12.2019, Volgio, u. Ĉeboksaro

Dmitriĵ Timin, arda partoprenanto de *Postcrossing*, invitis siajn samhobianojn kunveni okaze de la 160-jariĝo de Zamenhof por sendi al esperantistoj tra la mondo gratulajn bildkartojn, surskribitajn en Esperanto. La adresojn Dmitriĵ ĉerpis el la paĝaro de "Esperanto-Poŝtkruciĝo". Venis du knabinoj, kaj triope ili surskribis 21 speciale faritajn bildkartojn. La iniciato de Dmitriĵ estas admirinda. Okaze de la evento li kontraŭ propra mono desegnis kaj presis pli ol 50 unikajn bildkartojn, tre belajn. Indas lerni de gejunuloj pri inventemo kaj malŝparemo! Dum la renkontiĝo Dmitriĵ rakontis pri Esperanto kaj montris ekspoziciejon de Esperanto-literaturo.

15.12.2019

Socia movado "ШАХАР — Израиль у тебя на странице" https://vk.com/shakhar_news kun 48430 abonantoj kopias artikolon de Vlada Negina (21.01.2019) el la blogo "U-Jew"

<https://ujew.com.ua/business/evrejskie-izobreteniya.-lyudvik-zamengof-i-yazyk-esperanto>

ЕВРЕЙСКИЕ ИЗОБРЕТЕНИЯ. ЛЮДВИК ЗАМЕНГОФ И ЯЗЫК ЭСПЕРАНТО. К ДНЮ РОЖДЕНИЯ СОЗДАТЕЛЯ. О создании одного языка для всего человечества https://vk.com/shakhar_news?w=wall-23953205_1087719
La materialon en la grupo "V Kontakte" legis 2800 abonantoj.

Precipe interesa estis la renkontiĝo de studentoj kun tre interesa juna homo — Evgenia Sorokina. Ŝi rakontis pri sia vojo al Esperanto kaj pri komunikado pere de la lingvo kun homoj tra la tuta mondo. Studentoj interesiĝis pri alij lingvoj, kiujn Evgenia scipovas. Por mi la renkontiĝo kun Evgenia estis la ebleco paroli pri diversaj eventoj kaj homoj Esperante.

12.12.2019, Fora Oriento, u. Birobiĝano

Intervjuo de *Jevgenij Bojĉin* ĉe «Aŭtoradio. Birobiĝan»

La 12an de decembro ĉe 20-minuta intervjuo ĉe «Aŭtoradio. Birobiĝan» Jevgenij Bojĉin vigle kaj kompreneble klarigis problemojn kaj avantaĝojn de Esperanto. La materialo estis publikigita kaj en la radio-versio kaj en la televido, estis afiŝita sur la retejo de la televida kompanio. Ĝi estis spektata kaj aŭdata de almenaŭ 30 mil homoj en la Hebrea aŭtonoma regiono.

<https://riabir.ru/lenta/video/avtoradio/pryamaya-translyatsiya-narod-hochet-znat-pro-den-rozhdeniya-lazarya-markovicha-zamengofa-i-esperanto.html>

13.12.2019, Sudo, u. Volgogrado

Informas Muzea-ekspozicia centro de Krasnoarimea distrikto https://vk.com/mvcvlg?w=wall-55645339_1048 La 13an de decembro en Muzea-ekspozicia centro de Krasnoarimea distrikto de u. Volgogrado malfermiĝis nova ekspozicio: «Эсперанто — часть мировой культуры» ("Esperanto kiel parto de la monda kulturo"), dediĉita al la 160a datreveno de Ludovik Zamenhof, aŭtoro de la lingvo, kuniganta popolojn. Lernolibroj, artikoloj, raraj dokumentoj, fotoj, informiloj kaj aliaj eksponaĵoj, rakontantaj pri la lingvo, ĝia unikeco, simpleco kaj belo estas bazo de la ekspozicio. La ekspozicio funkcios ĝis la 15a de januaro.

15.12.2019, Sudo, u. Volgogrado





Ni danku ĉiujn menciitajn (kaj, espereble, ne menciitajn ĉi tie) esperantistojn, por kiuj Zamenhof-Tago estis ne nur festo ene de la rondo familia, sed ankaŭ evento, ebliganta rakonti pri li kaj disvastigi liajn ideojn. Pri tio li, certe, ĝojus.

La Zamenhofaj tagoj finiĝis. Ni direktas nin al aliaj festoj — transigo de la limo inter la 2019 kaj 2020 jaroj. Ni esperu, ke niaj sekvaj projektoj kaj kampanjoj pri popularigo de Esperanto estos pli sukcesaj. Konscian kaj fruktodonan agadon en la Nova Jaro!

*Irina Gonĉarova,
respondeculo de REU pri ekstera informado*



Jalto, Krimeo. En la 9-a Festivalo de lingvoj de la rusiaj popoloj

Nova ago de labordirekto “Ekstera informado”: Jarkalendaro kiel fonto de inform-motivoj por popularigi Esperanton

La 3an de decembro 2019 en la Ural-Siberia dissendolisto ural-siberio-dl@googlegroups.com aperis grava artikolo de Vladimir Opletajev pri kalendaraj datoj, kiuj povus esti preteksto por popularigo de Esperanto. La responda mesaĝo de Raja Kudrjavceva evoluigis tiun ideon. Kiel respondeculo pri ekstera informado en la Estraro de REU mi multe dankas al la samideanoj pro atento al tiu ĉi grava afero kaj esperas, ke dum la jaro en la vk-grupo “Informu!” <https://vk.com/informado> kolektiĝos aro da artikoloj pri la motiv-datoj, utilaj por Esperanto-popularigantoj. Ĉi tie ni citu fragmentojn de la menciita korespondado.

Vladimir Opletajev:

Irina Gončarova, kiu en la Estraro de REU krom multaj aliaj taskoj ankaŭ fosis sulkegon pri informado kaj popularigo de Esperanto en Rusio, iniciatis apartan eron de ĉi tiu kalejdoskope varia agaddirekto — krei inform-motivojn por publika informado fare de esperantistoj konforme al konkretaj tagoj de la jarkalendaro. En decembro 2019 la atendata kaj amase celebrata dato estas la 160a naskiĝdatreveno de Ludoviko Zamenhof. Se ni antaŭrigardos la kalendaron en januaro, ni trovos tagon, kiun esperantistoj povas preteksti kiel konvenan motivon por plia aktivado. Hodiaŭ mi prezentas informan artikolon, kiu eble lanĉos serion de inform-motivaj materialoj.



24. januaro — Internacia tago de edukado

Eduki signifas “direkti la elvolviĝon de fizikaj, moralaj kaj intelektaj kapabloj de infano aŭ junulo” (NPIV). Klerigi — fari iun kapabla, per ĝusta uzado de akiritaj scioj, klare juĝi kaj bone taksi la aferojn. (NPIV). Klerigi — instrui iun pri kulture utilaj temoj (ReVo).

Ambaŭ verboj interplektiĝas sence kaj kompletigas unu la alian. La rusa vorto «образование» tre ofte trovas en Esperanto la tradukan ekvivalenton “edukado”, ĉar temas ne nur pri klerigo kaj evoluigo de kapabloj kaj kompetentoj sed ankaŭ pri ensociigo kaj intelekta kapabligo de edukata persono. La rajto je edukado estas fiksita en la 26a Artikolo de la Universala Deklaracio de homaj rajtoj.

La Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj la 3an de decembro 2018 akceptis rezolucion pri la Internacia tago de edukado, kaj la 24an de januaro 2019 ĝi unuafoje eniris la kalendaron de la Internaciaj tagoj de UNO. Ni vidas do, ke tiu ĉi UN-tago estas tute nova, ĝi ne jam aĝas eĉ unu jaron.

En la mondo ĉirkaŭ 265 milionoj da infanoj kaj adoleskantoj restas ekster lerneja edukado, el tiu katastrofa nombro 55 milionoj eĉ ne vizitas elementan baznivelan lernejon. Tiuj ĉi infanoj suferas pro mizero, malsato, diskriminacio, militaj konfliktoj, eksterordinaraj situacioj, naturaj kaj teknikaj katastrofoj, klimatsanĝiĝo.

Universala Esperanto-Asocio en sia mesaĝo okaze de la Internacia tago de edukado emfazas la fakton, ke multaj infanoj estas malhelpataj lerni en siaj denaskaj lingvoj. “Universala Esperanto-Asocio, kiu antaŭenigas utiligon de la Internacia lingvo Esperanto kiel egalecan komunikilon je tutmonda skalo kaj favoras la lernadon de aliaj lingvoj en lernejoj, laboras por venki tian izolitecon, kunlabore kun ĉiuspecaj civilsociaj organizaĵoj.”

Jam pli ol unu jarcenton Esperanto estas amase perata al diversaĝaj sociaj tavoloj, kaj ĝia instruado neniam estas limigata nur per sole praktikaj kaj pragmataj taskoj — konigi la gramatikan bazon kaj paroligi homojn. La parolantoj de Esperanto konscias humanajn valorojn de la internacia lingva movado kaj aktive pledas por ĉiudirekta kleriga kaj eduka utiligoj de Esperanto.

Esperantistoj povas profiti la ŝancon kaj plani multajn interesajn kaj informajn aktivadojn okaze de la Internacia tago de edukado. Ne tuŝante la planadon de interna societa laboro, kiu povas ekzemple inkludi klubkunvenojn kaj raportojn por klubanoj pri la koneksa temo ktp, oni povas pli aktive alceli diversvoje la vastan publikon, informante ĝin pri Esperanto — elprovita moderna kaj efika ilo por la edukado de homoj pri aktualaj defiaj problemoj: pacaj interrilatoj, justa lingva komunika ordo, protektado de la natura medio kaj multaj aliaj. Praktike la iniciatoj de esperantistoj povas riviĝi per publikaj prelegoj en edukaj kaj soci-kulturaj stabloj, per pli aktiva interveno de esperantistoj en amaskomunikiloj, per verkado de artikoloj, per dissendo de informoj tra interretaj ligoj, per lanĉo de novaj kursoj de Esperanto...

...Variantoj multas. La Internaciaj tagoj de UNO estas proklamitaj por mobilizi homojn al urĝa solvado de gravaj problemoj, por atentigi homojn pri agadkampoj direktitaj al plibonigo de la tutmonda situacio. Ankaŭ rusiaj esperantistoj konscias la gravecon de la tuta spektro de eduka problemaro kaj atentigas ĝin emfaze.

Raja Kudrjavceva:

Atente traleginte la hieraŭan mesaĝon de V. Opletajev pri la okazonta la 24-n de januaro Internacia tago de edukado, mi ŝatus unue danki niajn senlacajn samideanojn: Irina Gončarova pro la interesa ideo koncerne de la informkampo en la Esperanto-movado kaj pro la nova utila iniciato, kaj Vladimir Opletajev pro la bonega informa artikolo pri la Internacia tago de edukado!

Mi plene konsentas, ke eblas profiti la bonan okazon nealtrude informi pri Esperanto dum tiuj Internaciaj tagoj de UNO, ĉar ofte en urboj ja okazas iuj aranĝoj, dediĉitaj al tiuj tagoj kaj indas nur anticipe esplori rete kaj alimaniere pri la lokoj, kie ili pasos. Kaj poste provi ligiĝi kun la organizantoj kaj proponi sian partoprenon dum tiuj aranĝoj.


Krome dezirindus, ke en la VK grupo "Informu" aŭ en REU-paĝaro anticipe aperu la preta modela artikolo, mesaĝo, informo, kiun eblas uzi por prelegoj, publikaĵoj en la lokaj gazetoj, por informo en aliaj amaskomunikiloj. Fakte tre bone faras tion UEA dum lastaj jaroj, proponante okazigi iun vastan internacian informkampanjon okaze de iu internacia tago kaj afiŝante la uzblan materialon en Esperanto, kun la propono traduki ĝin en bezonatan nacian lingvon.

*

Do, la nova temo “Jarkalendaro kiel fonto de inform-motivoj” aperas en “Informu!” Ĉiuj estas invitataj vastigi kaj aktualigi ĝin, proponante respublikajn, regionajn, urbajn inform-motivojn kaj ĉefe — produktante ideojn, kiel konkrete utiligi ĉiun apartan pretekston, kaj raportante pri siaj propraj agad-spertoj ĉi-temaj. Freŝajn sukcesojn al ni ĉiuj! Fruktonon kaj ĝojigan Novan 2020an Jaron, plenan je multsignifaj datoj!

Irina Gončarova

Novaj verkoj en la reta biblioteko de REU



Dum lastaj semajnoj en la retan bibliotekon en la paĝaro <http://reu.ru> estas aldonataj diversaj verkoj el la granda kolekto de Anatolo Sidorov. Tiu ĉi donaco de Anatolo estas dediĉita al la Tago de Esperanto-libro. Sufiĉe multaj (70 verkoj) jam aperis tie, do bonvolu interesiĝi, legi, esplori. La ligilo: <http://reu.ru/paghoj/pbf.html>. Tie estas kurta prezento de la kolekto kaj plena listo de elŝuteblaj dosieroj. Ni dankas Anatolon pro la valora donaco!

Aleksandr Lebedev

Klaras, ke laboro, farata de Anatolo, estas utila kaj bezonata. Sed imagu, kiom ĝi estas ampleksa, temporaba, ofte teda pro sia mekanikeco ktp.

Ni alte aprezu penojn de Anatolo kaj danku al REU pro atento al la rezultoj de liaj klopodoj kaj speciale al Aleksandro - pro enmetado de la materialoj en REU-paĝaron, kio faras ilin atingeblaj por ĉiuj. Tiuj agoj de la REU-prezidanto atestas, ke REU iĝas pli kaj pli atenta al entuziasma volontula agado de rusiaj esperantistoj. La vojo estas ĝusta! Koran dankon al ambaŭ!

Irina Gonĉarova

Kluba vivo Zamenhof-Tago tra la lando

Karaj amikoj! Ni bone komprenas, ke Zamenhof-tago estis festita en multaj lokoj en Rusio. Sed ni povas informi nur pri tiuj eventoj, pri kiuj la redaktoroj de "Ponto" ricevis ĝustatempan informon. Pri kio ne aperis sciigoj, elfalas el la memoro, kaj, fakte, kvazaŭ ne ekzistis...

Tomsk: 2 informoj pri la sama evento

La 14-an de decembro 2019 tomskaj esperantistoj (en Rusio, Siberio) produktis video-filmon pri Esperanto kaj pri urbo Tomsk omaĝe al la 160-a naskiĝtago de nia Majstro Ludoviko Zamenhof. La 15-an de decembro tomskaj esperantistoj kolektiĝis ĉe la festa tablo por festeni, rakonti pri la Majstro, montri la videofilmon, ekspozicii multajn E-librojn, numerojn de ĵurnalo "AKTUALE..." (kiu estis eldonata en Tomsk en la 80-aj kaj 90-aj jaroj), aliajn multajn esperantaĵojn. Kaj pridiskuti multajn erojn de la ekspozicio. Ni ankaŭ recitadis E-versojn kaj kantadis E-kantojn. Ktp.

Vladimir Minin



Kiel en multaj lokoj de la Tero, tomskaj esperantistoj kunvenis festi Tagon de E-libro kaj rondan datrevenon de naskiĝtago de nia Majstro. Komenciĝis festado per prezentado de E-libroj, pri kiuj estis prezentitaj skizaj interesaĵoj (en spirito de "Rondo de legado"). S-oro Minin rakontis pri gazetoj kiuj aperadis inter 1984-2000 far tomskaj esperantistoj. Tiam tio estis populara formo de interkomunikado, plejparte tajpitaj per mekanika tajpilo, laŭeble multobligataj. Poste la kunvenintoj transiris al festa tablo, kie ni tostis je memoro de Majstro, ĉu per vino, ĉu per "Tajga donaco" (senalkohola). Inter tinto de glasoj, forkoj kaj ŝmacoj fluis amika babilado pri okazintaĵoj ligitaj kun E-movado. Fine estis eĉ iom da kantado, ho ve, pro foresto de lignofajro kaj gitaro, rezultis ne tre korse. Atendu ni someron...

La 18.12. mi iom parolis pri datreveno de LLZ en loka radio — "Томский благовест" <http://radio-blagovest.ru/?p=6960>. Okazis tiel, ke mi trafis al radioelsendo kun bestdefendantoj, du ĉarmaj knabinoj. En la paĝo kiel bildon oni (mi ne scias kiu) metis bildon kun 2 goriloj... :-)

Gennadij Basov

Birobiĝan

La 12-an de decembro 2019 Evgenij Bojĉin donis intervjuon en "Aŭtoradio" en Birobidĝano, kie li detale rakontis pri Esperanto kaj ĝiaj celoj. 20-minuta rakonto estis publikigita kaj en la radio-versio kaj en la televido, estis afiŝita sur la retejo de la televida kompanio kaj ĝi estis spektata kaj aŭdata de almenaŭ 30 mil homoj en la Hebrea aŭtonoma regiono.

<https://riabir.ru/lenta/video/avtoradio/pryama-ya-translyatsiya-narod-hochet-znat-pro-den-rozhdeniya-lazarya-markovicha-zamengofa-i-esperanto.html>

Evgenij Bojĉin



Zamenhof-tago en Moskvo – 3-loke festita

En la klubo “Lev Tolstoj”

Ĉeestis entute 11 personoj, inkluzive la fondinton de la klubo Anatolo Gonĉarov, kiu speciale venis el Brjansko, kie li nun loĝas.

Nikolao Gudskov rakontis pri rilato de Zamenhof al reformoj en E-o. Oni iom diskutis.



Klara Ilutoviĉ deklamis sian poemon omaĝe al Zamenhof. Estis laŭtleĝita poemo de T. Auderskaja “Al la monumento de Zamenhof”.

Mi deklamis mian poemon el ĵus aperinta antologio “Poezio el ĉiuj ĉieloj”, vol. 5, premiitan kiel la plej bonan poemon en Esperanto 2019, ankaŭ poemon de N. Neĉaev el la sama kolekto.

Mikaelo Povorin kantis “Tagiĝo”-n (vortoj de A. Grabowski, muziko de V. Soroka), kaj aliajn kantojn. Sekvis tradicia te- kaj vinumado.

Valentin Melnikov

20-a Moskva Esperanto-Renkontiĝo (MER)

Dimanĉe, la 15-an de decembro, okazis la 20-a Moskva Esperanto-Renkontiĝo (MER).

Certe la ĉefa temo de la aranĝo estis **Zamenhof-Tago kaj la 160-jariĝo de L. L. Zamenhof**.

Malgraŭ, ke la antaŭjarŝanĝa tempo estas kutime tre tumulta, partoprenis 21 homoj.

Novaj lernantoj de la oficiala Esperanto-kurso en RUDN, kiun gvidas Anna Striganova, havis eblon tuje plonĝi en la maron de la Esperanto-kulturo.



La oficialan programon komencis Nikolao Gudskov, kiu rakontis pri Esperanta poezio, kiu aperis pli frue ol la lingvo mem, kaj pri tio kiel kaj kial vivas Esperanto.

Taŭriono Smikov parolis pri detaloj de poezia traduko en Esperanton. Klara Ilutoviĉ kaj Valentin Melnikov okazigis poezian vesperon.

Tradicia koncerto de Mikaelo Povorin ne lasis la partoprenantojn indiferentaj. Agrabla surprizo estis profesie preparita koncerto de Aleksandr Vikulov kaj Katrin, kiuj plenumis plurajn konatajn rok- kaj pop- kantojn en Esperanto.

Satigaj manĝoj, bonega etoso... kongreso... amikeco...



*Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova
laŭ dissendolisto <reu-agado> 17.12.2019*

Malfermita Zamenhof-Tago en Moskvo okaze de la 160a datreveno de Ludoviko Zamenhof

La 15-an de decembro, dimanĉe, moskvaj esperantistoj kunvenis en la salono de la lingva lernejo NISE ĉe metroo “Mendelejvskaja” por kunfesti la 160an datrevenon de Ludoviko Zamenhof. La renkontiĝon iniciatis, financis kaj iusence organizis REU-prezidanto Aleksandr Lebedev kaj la masiano Norden Fortvol. Tiuj du personecoj tute harmonie kunlaboris inter si kaj ankaŭ kun la klubanoj de “Lev Tolstoj”, masianoj kaj kelkaj eksterorganizaĵaj esperantistoj. Ĉeestis bunta kompanio el 20 spertuloj kaj novuloj: Aleksandro (Lipatov), Aŭ (Anna Fjodorova), Junjo, Denis (Botvinjev), Denis (Neĉajev), Dima (Abramov), Karter, Kira, Lunjo, Miĉjo Povorin,

PONTO n-ro 109, decembro 2019

Mihail Panbakisto, Mirina, Nikolao, Norden, Peĉjo, Romĉjo, Ruslan, Svetlana (Smetanina) kaj Tatjana (Glaznica), Vlad (Viĉegjanin).

Ĉe konatiĝo la homoj estis petitaj diri al sia hazarda parulo unu fakton el sia vivo, kiun eventuale scias neniu ĉeestanto, kaj poste la partnero anoncas tiun fakton pri sia parulo al ĉiuj. Tiel ni eksciis, inter multaj aliaj faktoj, ke Norden foje veturis per cervo, ke Panbakisto ekuzis linukson kaj nun legas la libron de Cezaro Rossetti “Kredu min, sinjorino!”, ke ŝatata metalgrupo de Kira estas la germana “Knorkator”, kiu ŝanĝis ŝian tutan vivon, instiginte ŝin lerni la germanan kaj lingvojn entute, kaj ke Mirina produktigis bildkartojn honore al la 160-jariĝo de Zamenhof — kaj tiuj kartoj tuj estis al ĉiuj disdonitaj donace de MEA MASI.



Sed antaŭ la konatiĝo ni aŭskultis redukitan prelegon de Nikolao, kiun li faris du semajnojn antaŭe dum la 14-a Moskva Lingva Festivalo, nome: “Поэзия, появившаяся раньше языка, или Как Заменгоф создавал эсперанто и что из этого вышло”. Evidentiĝis, ke Zamenhof kreis poemon kun la sama enhavo ĉe laborado pri ĉiuj siaj praesperantaj projektoj, ĉiufoje reverkante ĝin en nova varianto de la pralingvo, kaj en la fina versio ĝi aperis en la Unua Libro kiel versaro “Mia penso”. Bedaŭrinde, mi ne invitis Romĉjon deklami la poemon, kiun li scias parkere, ĉar atendis pli taŭgan momenton dum la planita Poezia Duonhoru, kiu — ve! — ne okazis pro manko de tempo en la programo.

Estis ankaŭ alia prelego. Mem inklina al vegetarismo, nia Norden decidis esplori, ĉu ankaŭ Zamenhof estis vegetarano. Pruvaj faktoj ne troviĝis, sed estis bona kialo iom studi historion de la vegetarismo en esperantista medio. Antaŭ la prelego, apoganta sin al sia laboro pri enmetado en REU-paĝaron de historiaj materialoj, donacitaj al REU de sanktpeterburga esperantisto Anatolo Sidorov, Norden rakontis pri tiu grava laborado kaj invitis esperantistojn aktive konatiĝi kun ili.

La prelegoj okazis ne sinsekve — ilin interrompis iom da tradukpraktikado. Svetlana Smetanina proponis por traduki kelkajn ruslingvajn ideomojn, kio, certe, elvokis multe da kaprompado kaj ridoj. Ekzemple, la frazon “Бабушка надвое сказала” oni tradukis kelkvariate, de “Avino diris dusence” ĝis “Ciganino aŭguris ambigue”.



PONTO n-ro 109, decembro 2019

Estis en la programo ankaŭ aŭkcio, lanĉita de Svetlana. Ĝi vokis grandan entuziasmon ĉe niaj novuloj, speciale ardege luktis la junaj knaboj. Ĉefe estis aŭkciaj bonaj libroj, sed ankaŭ MASI enmiksiĝis kun diversaj bagatelaĵoj — kio permesis riĉigi nian kason je iom malpli ol 2000 rubloj.



Estis ja ankaŭ kantado kun Miĉjo Povorin! Ni kantis 4 facilajn kantojn — bone konatajn al esperantistoj sed tute novaj por novicoj. Fine Miĉjo surprizis nin per du viglaj kaj humuraj novaj kanzonoj. Tiu koncerteto multe beligis la programon.

Estis ankaŭ gravaj anoncoj. Sveta rakontis pri RET, planata en Krasnojarsko por la sekvanta somero, speciale pri tre alloga flosado laŭ la pitoreska rivero Mana, kaj mi invitis ĉiujn al APERO-14, la 21-24an de februaro, denove en nia kara Jerŝovo. Antaŭan tagon estis presitaj flugfolioj, dum la kunveno disdonitaj,

kaj afiŝo pri la aranĝo, kiu paradis apud granda jubilea portreto de Zamenhof sur la tabulo.

Fine ni tostis gloron al Zamenhof kaj drinkis-trinkis-picumis-manĝis, libere babilante kaj poiomete forirante — ja proksimiĝis la 22a horo...

Dankon al Norden pro la iniciato kaj al ĉiuj, kiuj subtenis ĝin per kontribuoj al la programo kaj sia veno! Ni esperu, ke Zamenhof-Taga festado ekde nun estos tradicia ankaŭ por moskvaj esperantistoj!



Irina Gonĉarova

Peterburgo



La 18-an de decembro okazis Zamenhof-festo en la klubo "Kariĵono". Partoprenis 20 personoj. Estis prezentitaj videofilmetoj "Salutoj de esperantistoj de ĉiuj landoj" kun salutintaj personoj de multaj nacioj (Afriko, Ĉinio, Hispanio, Italio ktp.). Poste okazis festa prelego de Johannes Haazen pri Zamenhofo: pri lia strebo unuigi la homaron per la lingvo Esperanto. Dum la vespero funkciis libra butiketo. Post kafopaŭzo kun anekdotoj estis personaj salutoj de Anatolo Sidorov, Mikaelo Kolodin, Eŭgenij, Boris Kondratjev, Valeria Cvetkova.

Anatolo Sidorov



Krasnojarsko

La 15-an de decembro la 160-jariĝon de Zamenhof festis esperantistoj de la Krasnojarska klubo KRESKO.



Zamenhof-Tago kaj Tago de Esperanta Libro en Jekaterinburgo

La 21-n de decembro jekaterinburgaj esperantistoj kunvenis en la Domo de Uralaj Popoloj por kune festi la Tagon de la Esperanta libro kaj la 160-an naskiĝdatrevenon de Ludoviko Zamenhof. Tiu ĉi festo estas tradicie festata en Jekaterinburgo jam preskaŭ dum 20 jaroj. Ni ĉiam zorge preparas ĝin, efektivas specialajn Esperanto-projektojn aŭ aktivaĵojn antaŭ ĝi. Ankaŭ ĉi-jare dum du semajnoj antaŭ la festo kadre de la ural-siberia dissendolisto estis sukcese okazigita la reta Esperanto-aktivaĵo “Libroj, kiujn ni legas”, por kiu kontribuis 11 esperantistoj el 6 diversaj urboj, kaj estis prezentitaj 5 originale verkitaj en Esperanto libroj kaj 6 tradukitaj en Esperanton. Ĉiuj partoprenintoj de la aktivaĵo ricevis diplomojn pri sia aktiva partopreno kaj dum la Zamenhof-festo en Jekaterinburgo estis enmanigitaj tiuj diplomoj kaj libropremioj. Dum la enmanigo de libropremioj, iliaj ricevantoj montris al la ĉeestantoj siajn legitajn librojn kaj povis ion mallonge diri pri ili. Tre interese prezentis sian legitan libron “Zamenhof. Aŭtoro de Esperanto” de Marjorie Boulton nia aktivulino el Niĵnij Tagilo – Lidija Jerofejeva. Ŝi ne nur rakontis pri siaj impresoj pri la interesa libro, kiun ŝi elektis por la legado antaŭ la baldaŭa Zamenhof-festo, sed ankaŭ rememoris pri la aŭtorino de la libro, tre vaste konata Esperanta verkistino el Anglio – M. Boulton, kun kiu Lidija estis konata persone.



Krome, en la Domo de Uralaj Popoloj estis aranĝita ekspozicio de Esperanto-libroj, kies malfermo kun la informprelegeto pri Esperanto okazis la 14-an de decembro, kaj ĝi daŭre funkcias tie ĝis la 28-a de decembro. Ĉar la Domo estas vizitata de multegaj homoj de diversaj naciecoj, kiuj loĝas en Jekaterinburgo kaj Uralo, do tiu ekspozicio havas informkarakteron por la ekstera publiko. Ankaŭ la partoprenantoj de nia Zamenhof-festo povis vidi ĝin sabate kaj fotiĝi apud ĝi.

La programo de la Zamenhof-festo estis, kiel ĉiam, tre varia: ni kune spektis la filmon, faritan omaĝe al Ludoviko Zamenhof en Pollando, kaj rigardis la fotojn, kiuj reflektis jam okazintajn ĉi-jare diversloke en la mondo solenaĵojn, kiuj estis dediĉitaj al tiuj du Esperantaj festoj; havis apartan programeron, dediĉitan al la 125-a jubileo de la unua eldono de “Hamleto” de Ŝekspiro en Esperanto (des pli ke ĝian tradukon en Esperanton faris ankoraŭ mem L. Zamenhof), dum kiu ni kune laŭronde voĉlegis la faman fragmenton de tiu verko – la

monologon de Hamleto “Ĉu esti aŭ ne esti?”; aktive partoprenis poezian duonhoron, kiam ĉiuj dezirantoj povis deklami aŭ voĉlegi en Esperanto poemojn, kiujn ili elektis mem, kaj ĉiujn vere impresis la brila deklamado de nia gasto el Niĵnij Tagilo Sergej Potoskujev, kiu elektis por tio la poemon de M. Ju. Lermontov “Velo”. Ĉiuj ĉeestintoj ankaŭ povis aprezi freŝe produktitan de TEJO videofilmon “Esperanto en la mondo”, en kiu junularo el diversaj landoj de la mondo salutas kaj gratulas ĉiujn esperantistojn okaze de Zamenhof-festo 2019. Bedaŭrinde ĉi-foje pro diversaj kialoj ne povis ĉeesti la festan kunvenon ambaŭ niaj gitaristoj (Sergej Kumkov estis oficovojaĝe en Sankt-Peterburgo, kaj Konstantin Ĥlizov kune kun la filharmonia koruso, en kiu li kantas, partoprenis kantokonkurson en Moskvo). Tial kunkanti Esperante ni povis nur kune kun Heorgo Handzlik kaj Anjo Amika, spektante ilian kantadon surekrane.

Certe ni ankaŭ festenis tiuvespere, tostante je la sano de L. Zamenhof kaj je gloro de Esperanto, vigle komuniĝis unu kun la alia ĉe la tablo, interŝanĝis malgrandajn amikajn donacetojn. Sed min mem, nenion supozantan, atendis granda surprizo de mia esperantista amikaro, kiuj decidis fari en la jubilea por mi vivjaro donacon al mi kaj enmanigis saĝan poŝtelefonon! Verdire mi estis ne nur surprizita, sed ankaŭ tre konsternita, ĉar mi estas malmoderna homo kaj min absolute kontentigis mia malnova butona poŝtelefono. Sed estas ege kortuŝa la fakto, ke mi havas tiujn amikojn-esperantistojn, kiuj ŝatas ĝojigi min kaj samtempe modernigi ☺. Do, mi komencis studi la regadon de la saĝtelefono. Kaj volas tutkore danki ĉiujn miajn geamikojn!

Krom jekaterinburgaj esperantistoj nian festan kunvenon partoprenis kelkaj aliurbaj gastoj: Vladimir Viĉegjanin (eksa uralano, loĝanta nun apud Moskvo); Lidija Jerofejeva kaj Sergej Potoskujev el Niĵnij Tagilo kaj nia fidela tumena amiko – Pavel Veselov. Mi ankaŭ pensas, ke niaj amikoj-esperantistoj el Moskvo kaj aliaj foraj lokoj, kiuj ne povis fizike ĉeesti nian Zamenhof-feston ĉi tie, ĉeestis ĝin anime!



Estis vere tre ĝoje festi la Zamenhof-feston 2019 kune!

Raja Kudrjavceva

Volgogrado

Nia klubo "Espero" bone festis la 160-jariĝon de Ludoviko Zamenhof. En la suda parto de nia longa urbo ni aranĝis du ekspoziciojn. Dum iliaj malfermoj ni faris unuhorajn prelegojn pri Esperanto kaj pri la kreinto de la lingvo.

En "Muzea-ekspozicia centro" mi komencis nian feston per rakonto de biografio de Zamenhof. Post mi juna Danilo Aleksandrov recitis du versaĵojn. Pri kelkaj gravaj gramatikaj reguloj de la lingvo rakontis Tatjana Vtorova. Ŝi fine plenumis strofon de "Okuloj nigraj". Partoprenis la aranĝon plenkreskuloj. Pri UEA-kongreso, Esperanto-movado en la mondo, la lando kaj Volgogrado denove rakontis mi. Finiĝis la prelego per muziko. Dank' al Vera Dumler ĉeestantoj aŭskultis, kiel sonas la lingvo, per bela, klara kantado de Pavel Moĵaev (per lia disko). Ekplaĉis al ĉiuj fragmento de filmo, kie Kuravlov dancis kaj kantis en esperanto.

Granda ekspozicio estis en alia salono, malsupre. Sur la muroj pendis multe da artikoloj (sub vitro), portretoj, vitrinaj de fotoj. Sur tabloj kuŝis libroj, vortaroj, kantaraj, diskoj, albumoj, leteroj, gazetoj el multaj landoj. Homoj rigardis, demandis, fotis! La ekspozicio restos tie dum monato.

Post semajno simila prelego okazis en germana biblioteko de la muzeo "Staraja Sarepta". Nur unu diferenco: mi samtempe rakontis kaj montris eksponaĵojn. Post rakonto la vizitantoj havis eblecon atente ĉion memstare trarigardi. Muziko kaj versoj ne estis. Tuj post ni aperis infanoj kun Avo Frosto.

Dum preparo kaj aranĝo de ambaŭ eventoj al mi multe helpis Ludmila Bykova.

En la centro de la urbo, en biblioteko je la nomo de Gorĵkij estis kunveno okaze de la 160-jariĝo de Zamenhof. Ĉeestis esperantistoj kaj eksterlandaj studentoj. Prelegis Dmitrij Ĵuravlov pri Hillelismo, kaj Valentina Spicina rakontis pri Esperanto kaj Zamenhof. Poste oni rigardis mallongan filmon pri Ludoviko Zamenhof.

Valentina Spicina

Oni pri ni

МБУ «ЦЕНТР КУЛЬТУРЫ И МОЛОДЕЖНОЙ ПОЛИТИКИ»
Музейно-выставочный центр Красноармейского района Волгограда

13.12.2019/15.01.2020

Выставка, приуроченная к 160-летию со дня рождения Л. Заменгофа, создателя языка, объединяющего народы, языка эсперанто.

**Esperanto -
часть мировой культуры**

Волгоград, ул. 50 лет Октября, 17. Тел.: 62 73 56

La afero de Ufaj esperantistoj



En Baŝkiria literatura revuo "Belskije prostory" n-ro 11-2019 aperis ampleksa artikolo de Jevgenij Ĉegodajev "La afero de Ufaj esperantistoj" (Евгений Чегодаев. Дело уфимских эсперантистов): <https://bp.rbsmi.ru/articles/kraevedenie/11-2019-Evgeniy-Chegodaev-Delo-ufimskih-esperantistov-18358/> La artikolo rakontas pri sorto de esperantistoj el Ufo Olga Kazina, deveninta el Libava (nuna Latvio) kaj ŝia edzo Teobald Heger, deveninta el Aŭstrio, ambaŭ aktivaj membroj de SU kaj SAT. Ambaŭ estis arestitaj aŭtune de 1933 kaj kondamnitaj al 8 jaroj de prizono (Heger) kaj 3 jaroj de ekzilo (Kazina) – fakte, ne pro esperantista agado, sed pro "kontraŭsovetiaj" elpaŝoj.

Krom Kazina kaj Heger, en la artikolo estas menciataj ankaŭ aliaj Esperanto-aktivuloj de Ufo en la 1930-aj jaroj: Korovkin, Krassovskij, Habibi, Ŝelomencev, Popov, Foss, Valeev, Basov, Kumraŝ.

La esploro estas tre bone farita, kun precizaj informoj pri la tiama E-movado, kaj vere interesa. Ĝi povas esti grava fonto por historio de la movado en Baŝkirio kaj meritas tradukon al Esperanto por publikigo en iu revuo (unuavice, "Ĉerbe kaj Kore"). Espereble, iu el la baŝkiriaj esperantistoj tion faros!

Sciigis pri la publikaĵo Boris Kolker

Esperanto kiel lingvo de la estonta homaro

La fama harjkova verkisto Andrej Valentinov (Ŝmalko) nun laboras pri nova 9-voluma epopeo "Argentina". Dume aperis 6 volumoj. En la 5-a libro, "Leichtweiß", ni povas trovi la jenan pecon (estas priskribata evento de 1932-a jaro):

«"Sed ĉu mi estas germano?" – sincere miris Kola Taube, kiam kompleza oficisto en la ambasado aludis pri translokiĝo al la Patrolando.

Ili parolis, kompreneble, en la germana. La lingvon li sciis de la infanaĝo, cetere, same kiel la patrinan – la ukrainan. Pri la propra nacieco li speciale ne enpensiĝis, kaj kiam oni ja demandis, li penis rerakonti tion, kion li legis en libroj. La nacio kaj popolo ne estas la samo, ne gravas, kio oni naskiĝis, ĉefas kio oni sin sentas. Kaj ne ekzistas unuecaj nacioj. La nuntempaj germanoj parolas malsame, ilia nacio estas juna, ankoraŭ ne plenkreskis. Kaj ne plenkreskos, ĉar dum plena komunismo la nacioj malaperos, kaj la homoj komencos interkomunikiĝi en Esperanto.

En enketiloj li nomis sin ruso. Kio ja krome?

Al la oficisto li pri Esperanto ne diris, kaj tiun pli interesis, ĉu vere la familio Taube el la Orienta Prusio, sendinta la inviton, havas "parencajn rilatojn" kun la rusaj Taube...»

Poste Esperanto ne estas menciata, kaj ne klaras, ĉu la protagonisto mem sciis Esperanton, ĉu nur sciis pri ĝia estonta rolo.



Vintrinkejo “Esperanto” en Grodno en la domo de Zamenhof



En Grodno oni malfermas novan vintrinkejon, kiu nomiĝas “Esperanto”. Diference de multaj similaj lokoj, kiuj havas al nia lingvo neniun rilaton, tiu ĉi estas dense ligita al Esperanto kaj Zamenhof. Unue, laŭ la koncepto de la mastroj, “ankaŭ vino estas siaspeca internacia lingvo, kiu proksimigas la homojn”. Due, kaj grave, la trinkejo lokiĝas en la domo, kie en 1893-97 loĝis nia Majstro! Pli ĝuste, la domo post tiu tempo estis minimume dufoje draste rekonstruita, sed ja la loko estas sama, kaj sur la doma muro ekzistas koncerna memortabulo. Murojn de la trinkejo ornamas kelkaj esperantlingvaj surskriboj.

La artikolo en “Vespera Grodno” sufiĉe klare rakontas pri Esperanto kaj Zamenhof, kaj eĉ mencias detalojn de lia biografio el la Grodna periodo: <http://vgr.by/2019/12/23/s-originalnoy-kartoy-i-unikalnyimi-kokteylyami-na-kirova-otkrivaetsya-novyiy-bar-posvuyashhennyiy-legendarnomu-yazyku-esperanto/>

UEA informas

UEA lobiis por esperanto en la 40a ĝenerala konferenco de Unesko

La 40-a sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko okazis en Parizo de la 12-a ĝis la 27-a de novembro. UEA estas neregistara organizo (NRO) en rilatoj kun Unesko de 1954 kaj tie havis siajn reprezentantojn sed ankaŭ ILEI kaj TEJO estis akceptitaj kiel observantoj.

Niaj delegitoj Barbara Despiney, François Lo Jacomo, Gilles Tabard, Julien Enselme kaj Renée Triolle faris sian eblon por lobiĝi ĉe naciaj delegitoj en la salonoj, koridoroj, ĉemanĝe. Konstateble estas, ke la pli maljunaj scias pri la internacia lingvo, aliaj kun intereso aŭskultas pri ĝi, ĝiaj valoroj por justa komunikado aŭ volas aŭdi, kiel ĝi sonas, des pli pro tio, ke malgraŭ la 6 oficialaj lingvoj regis la angla. Eĉ belga reprezentantino parolis angle, “ĉar la plimulto de la administraj dokumentoj estas nur en la angla”.

Tio evidentiĝis dum debato pri “Malfermita scienco”, kiam estis proponita surekrane la rezolucio pri tiu temo en la angla kaj la franca; sekve ankaŭ Rusio kaj arabaj landoj komentis aŭ proponis en la angla, ne en siaj lingvoj. En la Pleno aŭdiĝis la portugala el la buŝo de delegitoj el Portugalio, Brazilo, Angolo kaj Orienta Timoro, kaj hinda el la buŝo de Hinda Unio. Klare sentiĝis la “imperismo” de uzataj lingvoj, kiam delegito de Ukrainio “atakis” Rusion ... en la hispana! Nur asocio de sciencistoj citis lingvo-diskriminacion en la debato pri “Malfermita scienco” kiam la politiko estas lasi neniun flanke, t.e. virinoj kaj handicapitoj, neniam minoritatoj, eĉ dum tiu Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj.

La NRO-j disponis pri salono por lasi dokumentojn, renkontiĝi, informiĝi. Duan jaron sinsekve, UEA rajtis alparoli la Plenon. Pro foresto de junuloj, tion faris Lo Jacomo nome de UEA. Lia interveno estas videbla ĉe <https://www.facebook.com/ngounesco>, bela pruvo, ke UEA estas konsiderata kaj bone taksata de la Ligkomitato Unesko-NROj.

Ni kontaktis diversajn delegaciojn por peti ilian subtenon por nia plua paŝo post eldono de “Kuriero de Unesko”: la agnosko de Esperanto kiel nemateria monda heredaĵo.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 836, 2019-11-22

Reeĥoj pri nia agado

Aŭtoroj kaj agantoj de la ILEI-projekto “Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lerneĵano” admiras sukcesojn de Rusio

29.11.19, Lu Wunsch-Rolshoven (Germanio), prezidanto de EsperantoLand al: LANDA-AGADO@yahoo.com

Saluton!

Historio de la ILEI-projekto “Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lerneĵano”

Antaŭ kelkaj jaroj mi komencis popularigi la ideon, ke antaŭ instruado de Esperanto en lernejoj plej bone oni unue informu multajn lerneĵanojn pri Esperanto kaj ĝia hodiaŭa uzado — dum unu aŭ du lecionoj. Tiucele mi lanĉis la agadon “Unu leciono pri Esperanto” por lerneĵanoj. Kompreneble mi longavide ŝatus, ke ĉiu lerneĵano en la mondo havu tian lecionon — sed mi ja tre konscias, ke tia celo daŭros ankoraŭ iom... :)

Klaus Friese el Hamburgo, pensiĝinta instruisto, verkis etan broŝuron pri la temo, en kiu mi kunlaboris. Intertempe la broŝuro ekzistas en ses lingvoj (Esperanto, franca, angla, itala, germana, turka). ... Pliaj tradukoj kompreneble treee bonvenas :)

Mireille Grosjean tre afable subtenas la agadon ĉe ILEI kaj metis multan materialon sur la ILEI-paĝon <https://www.ilei.info/agado/projektoj.php>

Ŝi ankaŭ verkis pri la agado en la Ondo de Esperanto: <http://sezonoj.ru/2017/05/ilei-13/>



Brila kampanjo por "Unu leciono" en Rusio

Dum septembro kaj oktobro rusiaj aktivuloj sub gvido de Irina Gončarova nun realigis brilan kampanjon por "Unu leciono pri Esperanto" kun grandioza sukceso: 12 homoj instruis, ili prezentis sume 27 lecionojn pri Esperanto en 15 klerigejoj. Ĉeestis entute 666 lernejoj de la 5-a ĝis la 11-a klaso kaj aldone studentoj aĝaj ĝis 21 jaroj. Admirindege :)

Jen ekzemplodona agado, kiu bonege funkciis :)

Grandan gratulon al la gvidantino de la projekto "Unu leciono pri Esperanto por lernantoj" en Rusio, Irina Gončarova, kaj al ĉiuj kunagantoj: *Aleksandr Blinov*, 17-jara *Dmitrij Timin*, 16-jara *Matvej Blinov*, *Ivan Sarkisov*, *Artemij Ĉirkovskij*, *Viktor Lagutin*, 15-jara *Roman Ralko*, *Dmitrij Ĵuravljov*, *Jelena Kuznecova*, *Eŭgeno Bojĉin*, *Ikar Akimenko*.

Sube artikolo pri la sukcesa kampanjo en Rusio el *La Ondo de Esperanto*, 2019, N-ro 11, p. 27-28

Mi tre ĝojas pri tiu bela paso antaŭen :)

Eble en iuj aliaj landoj troviĝos ankaŭ aktivuloj, kiuj ŝatos survoji similan kampanjon, ĉu?

Lu Wunsch-Rolshoven

Germana Esperanto-Asocio, respondeculo pri gazetaro kaj publikaj rilatoj

30.11.2019, Klaus Friese

Estimata S-rino Gončarova,

en 'La Ondo de Esperanto' mi legis la artikolon pri la projekto 'Unu leciono pri Esperanto por lernantoj'. Mi ĝojas ke en via lando troviĝas tiom multe da subtenantoj. Tiun projekton mi ja mem lanĉis en Hamburgo. Tie mi vizitis multajn lernejojn kaj transdonis miajn broŝurojn. En via artikolo vi klarigis, ke en via lando la projekto estas iomete ŝanĝita. Mi admiras vian jam nunan sukceson.

La baza ideo de mia projekto ja celis al instruistoj, kiuj ne estas esperantistoj. Tial oni nepre bezonas la broŝuron en la loka lingvo. La Esperanta versio nur taŭgas por informi la Esperantistojn en la diversaj landoj. Sed mi konfesas, ke ne estas facile informi la lernejojn, ĉar tiam oni bezonas ja aktivulojn, kiuj konas Esperanton kaj povas klarigi la aferon al la respondeculoj de la lernejoj.

Mi ĝojus, se mi ricevus retleteron de vi aŭ de alia samideano, kiu subtenas la projekton.

Kore salutas vin

Klaus

02.12.2019, Grosjean Mireille, prezidanto de ILEI

al: Lu Wunsch-Rolshoven, Klaus Friese (iniciinto kaj ellaborinto de ILEI-projekto "Unu leciono por ĉiu lernejo", Irina Gončarova (gvidanto de la tutrusia projekto "Unu leciono pri Esperanto por lernantoj")

kopie al: IRE Nemeth Jozefo (redaktoro de IPR)

Temo: por IPR pri UNU LECIONO PRI EO POR ĈIU LERNEJANO

Karaj gekolegoj.

Tiu mirinda rezulto en Rusio tre ĝojigas min. Gratulojn al Irina kaj al ĉiuj, kiuj ekpaŝis kaj transprenis la prezenton.

Dankon al Lu pro la transdono de informo.

Ĉe ILEI la kolekto de materialo plu iras. Jen informoj.

Sed mi unue proponas, ke tiuj du partoj subaj, unu de Lu kaj unu de Irina, iru al IPR 2020/1 kune kun novaĵoj de ILEI.

Se ni aperigos prezenton en IPR, ĉio devas esti preta en la retejo www.ilei.info la 15-an de januaro. Tio ŝajnas al mi ebla.

Amike kaj kunlaboreme -

Mireille Grosjean

20.12.2019, Germain Pirlot (Belgio)

Mi ĵus legis vian tre interesan raporton pri la sukceso en Rusio de Unu leciono pri Esperanto por lernantoj. Temas pri bonega ekzemplo por alilandoj.

Substrekinda estas ankaŭ la aktiva partopreno de junuloj. Gratulegojn al ĉiuj kunlaborantoj!

Kore via, Germain Pirlot

Aranĝoj

Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj en Moskvo



La 86-a IKBE laŭ decido de LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj, en kunlaboro kun UEA) kaj sub aŭspicio de REU okazos inter la 27-a de junio kaj 04-a de julio 2020 en la ĉefurbo de Rusio Moskvo.

La temo: "Esperanto kaj muziko unuigas nin!". Partoprenantoj loĝos, manĝos kaj kongresumos en la hotelo "ReaKomp" centre de Moskvo (Protopopovskij pereulok, 9), metrostacio "Prospekt Mira". Estas atendataj gastoj el Japanio, Brazilo, Italio, Bulgario, Francio, Svislando, k.a. En la programo okazos kursoj, prelegoj, duontaga ekskurso tra Moskvo (buse), unutaga ekskurso al urbo Sergiev-Posad, diskutoj, renkontiĝoj, koncertoj. Estas invitataj al la IKBE ĉiuj dezirantoj, ĉu partatempe, ĉu plentempe.

Por sukcesa okazigo de la Kongreso bezonatas volontuloj por renkonti-akompani en stacidomoj kaj flughavenoj, kungvidi aranĝojn kaj ekskursojn. Kun viaj sinproponoj bonvolu turni vin al ano de la Organiza Komitato flanke de REU **Svetlana Smetanina: sysmetanina@yandex.ru, tel. 89266083244.**

Bonvenon kaj koran antaŭdankon!

APERo-14
invitas vin
21-24.02.2020
al Jerŝovo
por festi 25-jariĝon de
MEA MASI
kaj aliajn jubileojn!

Парк-отель «Ершово»

Московская область
Одинцовский р-н
с. Ершово, д.51А
домик филиала 5

Prezoj:

1 diurno - 1700 r
3 diurnoj - 5100 r
aliĝkoto - 700 r

https://vk.com/apero_ek_masi

Jubileo

Karaj amikoj, bonvolu ne forgesi kotizi por la jaro 2020!

KOTIZOJ de REU por 2020

Membri en REU oni rajtas ekde la aĝo 18 jaroj; 14-17-jaruloj rajtas aliĝi kiel kandidatoj kun samaj rajtoj krom voĉdonrajto. Por iĝi membro de REU necesas nepre plenigi kaj sendi aliĝilon <http://reu.ru/aligho/eo> kaj pagi koncernan membran kotizon. Aliĝanto konsentas, ke lia/ŝia nomo, familinomo kaj regiono aperos en la publika membrolisto de REU.

Oni rajtas aliĝi por unu aŭ por kelkaj sinsekvaj jaroj, paginte respondan kvanton da kotizaj sumoj.

1. Individua kotizo — 250 rub. (por ekster-KSS-anoj — 20 eŭroj). La individua membro ricevas elektronikforme membrokarton, «Ponton», Jarlibron de REU kaj aliajn informojn (ĉe neceso sendi oficialajn leterojn REU povas fari tion per ordinara poŝto), voĉdonrajton dum Konferenco de REU, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en REU-aranĝoj.
2. Membro-subtenanto — ne malpli ol 2-oblo de la individua kotizo. Membro-subtenanto ricevas ĉion saman kiel la individua membro.
3. Kolektiva kotizo — 200 rubloj por ĉiu aliĝinta membro (la aliĝintaj kolektivoj pagas minimume por 5 aliĝitaj membroj). Aliĝitaj membroj ricevas ĉion saman kiel la individuaj membroj.
4. Aliĝklotizo por nova aliĝinta kolektivo, aŭ okaze de realiĝo — 300 rubloj. Unufoje pagata de nova aliĝinta kolektivo. Jam aliĝintaj kolektivoj ne pagas. Nova kolektivo iĝas regiona organizaĵo de REU kaj laŭpete ricevas dokumenton pri tio. Se kolektivo ne pagas kotizojn por aliĝitaj membroj dum du sinsekvaj jaroj, ĝi poste devas denove aliĝi al REU.
5. Kandidato — senkotiza aliĝo. Ricevas ĉion saman kiel individua membro krom voĉdonrajto.
6. Amiko de REU — pagas kiel la kotizon ajnan sumon. Personoj, ne atingintaj la 18-jaran aĝon, aliĝas kiel amikoj de REU senkotize. Amiko de REU estas persono, kiu esprimas simpatian al REU. Rajtas partopreni en programoj kaj aranĝoj, organizataj de REU kaj ricevi informmaterialojn de REU. Ne havas voĉdonrajton kaj rabatojn.

Plenan regularon pri membreco legu ĉe <http://reu.ru/paghoj/kotizoj2020.html>.

Pagmanieroj

Sberbank

Al la banka karto **5469 3800 7074 4643**. Ĝiron eblas fari senpere en bankoficejo, per la servo «Sberbank Online», per bankaŭtomato kaj terminalo. Informo kaj instrukcioj: <https://www.sberbank.ru/ru/person/remittance/sbercards>.

Tinkoff-bank

Al la banka karto **5536 9138 1721 8676** Por pago uzu la servon <https://www.tinkoff.ru/cardtocard>.

Jandeks.Mono

Vi povas pagi al la monujo **41001363815184** en la sistemo «Jandeks.Mono». Informo kaj instrukcioj: <http://money.yandex.ru/prepaid>.

WebMoney

Vi povas pagi al unu el la monujoj en la sistemo «WebMoney»: **R260517915684** — rubla, **Z537491368483** — dolara
<https://www.webmoney.ru>

PayPal

Vi povas fari ĝiron en dolaroj per la sistemo «PayPal» al la adreso amikko@yandex.ru. <https://www.paypal.com>

Per kontanta mono


Post anticipa interkonsento ĉe persona renkontiĝo kun la kasisto en Moskvo aŭ dum aliurbaj aranĝoj.

Bonvolu nepre konsideri, ke samtage kun la ĝiro **vi devas informi pri via pago** la kasiston retroŝte aŭ per SMS-mesaĝo al la telefono.

Retpoŝto: amikko@yandex.ru. Telefonnumero: +7 977 412 1753 (Aleksandr Lebedev)

Vi devas informi pri celo de la pago, ĝirita sumo kaj nomo(j) de homo(j), por kiu(j) estas destinita la pago.

Se vi ne informos nin, **la mono estos konsiderata kiel anonima donaco por la kaso!**



Mi, la bela verda rato, gratulas la esperantan popolon okaze de proksimiĝanta nova 2020-a jaro kaj deziras sukcesojn en ĉiufanka promocio de nia lingvo!

**“Ponto” [Bulteno de REU (BdR)] estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo
“RUSIA ESPERANTISTA UNIO”**

La revuon aŭtomate ricevas ĉiuj membroj de REU, ĉiuj ceteraj povas aboni ĝin ĉe la Estraro kontraŭ 250 r. jare

**“Ponto” atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru
aŭ (kaj) Svetlana Smetanina svsmetanina@yandex.ru**

Estraro de Rusia Esperantista Unio